esperanto
internacia lingvo

Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj

~~Esö u [redacted], H-1034 Budapest~~


31 aŭgusto 1992

GAZETARAJ KOMUNIKOJ

## 26a Konferenco de ILEI:

### Pli granda, internacia kaj aĝvaria

Kun 112 partoprenantoj el 23 landoj, la 26a ILEI-konferenco en Bratislavo /Slovakio/ estis la plej granda kaj internacia de la lastaj jaroj. Dank' al la situo, kolegoj el Pollando, Rumanio, Hungario kaj Bulgario povis unuafoje partopreni, dum instruistoj el Aŭstralio, Argentino, Islando, Israelo, Usono kaj Zairio kompletigis la internaciecon. La aĝvario estas dankebla al nova iniciato de ILEI, gimnazia semajno por 13—16-jaruloj paralele aranĝita. /Vidu apartan raporton/.

Ĉeftemo de la konferenco estis la vivo kaj lingvo-instruaj teorioj de la pionira pedagogo Komenio, kies 400-jaran jubileon oni nun celebras. Temajn prelegojn prezentis d-rino Vera Barandovska-Frank kaj s-ro Miroslav Malovec. Gast-prelegis en la malfermo la vic-prezidanto de UEA, d-ro Ulrich Lins, laŭ la temo "Edukado kontraŭ naciismo"; tio spronis viglan kaj aktualan debaton pri ŝovinismo, naciismo, internaciismo kaj paco kaj ilia rilato al E-instruado. Deko da pliaj prelegoj okazis dum la semajno kaj ankaŭ Cseh-seminario organizita de IEI.

Du novaj sekcioj estis akceptitaj: Kroatio kaj Rumanio. Aliĝpeto de Kubo estos poŝte traktita; rilatoj kun instruistoj estis starigitaj en la lasta jaro en Albanio, Armenio, Aŭstralio, Islando, Togolando kaj Ukrainio. Sur la eldona kampo konkreta atingo estis la apero de la dua kajero de la porjunulara lernolibro "Tendaraj tagoj". Okazis parta estrarelekto, per kiu reeniris la gvidan organon d-ro Till Dahlenburg el Germanio.

Dum la UK en Vieno la Komitato de UEA akceptis regularon por la supera nivelo de la ekzamenoj de UEA/ILEI, kaj sesio por la elementa ekzameno rezultis en naŭ sukcesintoj kaj por la meza dek du.

RG/SMG

## Instruista kurso:

### Kiel instrui komunike

Ekzistas ne nur la gramatika kaj la Cseh-metodo en la mondo. Kiu volas spertiĝi pri la nuntempe populara kaj sukcesa situaci-komunika aliro al lingvo-instruado havos la okazon en la Esperanto-Centro Poprad de la 6a ĝis la 9a de novembro 1992. ILEI okazigos tie intensan partoprenigan tri-tagan kurson por konigi la filozofion kaj teknikojn de tiu metodo.

La kotizoj estas moderaj konforme al la limigita pagipovo de praktikantaj instruistoj ajnlande: 48 ĝis 60 gld. por kurso, loĝigo kaj manĝoj. La kurso baziĝos sur la lernolibro "Tendaraj tagoj" kaj donos konsilojn kiel apliki ĝin kaj kiel organizi rol-ludojn. Informoj kaj aliĝilo de: ILEI, ~~Esö u [redacted], H-1034 Budapest.~~